



Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, 6-a de Novembro 2017

Ĉeestantoj: Amri Wandel, Dror Gaon, Asaf Ĥefec, Matilda Landaŭ, Ŝlomo Ŝaĥar, Jehoŝua Tilleman.

*Protokolo de la antaŭa kunsido (2-a de Oktobro 2017) - sendita al la partoprenantoj.
Precizigo far Jehoŝua.*

1. Zamenhofa Vespero

Matilda: Kiu prelegos? Propono – en E-o: Mikaelo Lineckij. Ne estis trovita preleganto hebree.

2. Raportoj

a) **Jehuda Miklaf** prenis la postlasaĵon de **Mikaelo Giŝpling** al sia laborejo en Jerusalemo.

b) En la novembra n-ro de revuo Esperanto aperis nekrologo de Jehoŝua pri Mikaelo Giŝpling.

Ne aperis nekrologoj pri Kerbel kaj Liana, kiujn Jehoŝua ja sendis al la CO. Amri skribis pri tio al la redaktoro, Dima Ŝevĉenko, kiu respondis, ke li ne ricevis la nekrologojn de la CO. Ili aperu en la januara n-ro.

c) **La Jerusalema grupo** renkontiĝis merkrede, la 25.10, en la Ortodoksa Centro. Ĉeestis Ans Bakker kaj ŝia filino Chaja.

ĉ) Dimanĉe la 22.10-an Amri prenis So Gilsu de la landlimo (ponto Allenby) kaj ĉiĉeronis lin, lian edzinon kaj Ans Bakker ĉe la Morta Maro (Kumran, Ein Gedi) kaj Jeriĥo.

d) En la 38-a Kataluna Kongreso Amri salutis dum la inaŭguro nome de ELI.

3. Esperanto-kurso en Tel-Avivo

Jehoŝua: post telefonvoko kun Doron li ne certas, ĉu Doron ankoraŭ volas instrui la kurson. Amri: Doron pozitive respondis retmesaĝon pri la kurso kaj reklamaj temoj.

a) **Reklamado**

1) La **reklamkomisiono** ne povis funkcii pro personaj kialoj.

2) La efektiva reklamado **prokrastiĝis** pro necerteco pri la salono.

3) **Amir Naor**, kiu proponis helpi, reklamis per Google, lastatempe akiris du kandidatojn

4) Amri **proponas** reklami per Facebook. Por kioma buĝeto? **Decido:** 300 NIS.

5) aliaj rimedoj: afiŝoj, gazetaj anoncoj...? Amri: Doron skribis, ke estas ĉe li malnovaj afiŝoj, kaj li pretas ŝanĝi la telefonnumeron. Proponas demandi Amir. [Sekve li demandis kaj Amir konfirmis, ke li volonte respondos telefonojn].

b) **Salono** - okazis voĉdono pri la propono de Amri, prezentita en la tagordo de la oktobra kunsido (sed fine ne voĉdonita, pro la interveno de Joela): la kurso okazu en la kluba ĉambro en WIZO, post la klubhoroj: klubo – 18:30-19:30, paŭzo – 10 min, kurso 19:40-21:00. **Decido:** jes, unuanime.

2/...



- c) **Kie okazos la estrarkunsidoj dum la kurso?** Ne en la vestiblo de WIZO pro la plendoj.
Decido: en apuda kafejo.
- ĉ) **Kotizo** – 400 NIS. *Decido:* jes, unuanime.

4. Kurso/kunvenoj en Jerusalemo

- a) Antaŭ la kunveno okazis **E-leciono**, venis 5, instruis Amri kaj Laurin Lewis.
- b) **Reklamado:** Amri faris Facebook kampanjon por konigi la kurson por 110 NIS: 4,000 spektroj, 150 reagoj; Laurin anoncis (senpage) en aldonajo de "Jerusalem Post" kaj en aliaj.
- c) Laurin pagis 150 NIS por la ĉambro. Ŝlomo repagu al li 100, ĉar 50 li ŝuldas por ĉemizo.
- ĉ) **Venontaj** kunveno kaj leciono: la 22-an de Novembro.

5. Proponitaj aĉetoj

- a) E-flagoj pere de E-Bay (Jagil). *Decido:* jes, unu grandan flagon.
- b) 10 ekzempleroj de "Ŝvilim" (loka revuo en Modiin – po 20 NIS) kun artikolo de Josi pri Lidia Zamenhof kaj E-kanto. *Decido:* jes, unuanime.

6. Israela E-isto

N-ro "vintro 2017"; redaktoro - ĉu Mikaelo Lineckij? Jehoŝua proponos al li.

7. Modifita afiŝo por la IK en Eilat – 2019

Ĉu inviti ankaŭ JoMo-n? *Decido:* jes, depende de la nombro de aliĝontoj kaj la buĝeto.

8. Financoj

Ŝlomo prezentas la kvaronjaran buĝeton. Rilate la hipotekon por la oficejo, laŭeble ĉi semajne li iros kun Jehoŝua al la "Bank Mizraĥi-Tefaĥot" en Tel-Aviv.

La venonta kunsido: lunde, la 4-an de Decembro 2017, je 19:45

Protokolis: Amri Wandel